# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



PLENUMITA 06/10/2022 Sescenttria eldono (unua eldono 20/09/2011)



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .

Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ http://thesaker.is/

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 682,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **299,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **155,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **137,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018

Nun studas **91,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )



## Esperanta Retradio



DONAS BONAN ĈIRKAŬ-5 MINUTAN AŬSKULTADON KAJ LEGADON ĈIUN TAGON

**JE KIOMA HORO VI MANĜAS?**

30-a de septembro 2022

## Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.** Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Vi respondecas pri via sano, do portu maskojn.

*Roger Springer*




Katja kaj Trevor Steele transloĝiĝis. Se iu deziras kontakti ilin, la stratadreso estas *40 Wodonga Street, Beverley SA 5009.* Ni ne plu havas endoman telefonon, sed poŝtelefonojn: Katja 04 3021 0569, kaj Trevor 04 50 7177 91.



Ni salutas ĉiujn samideanojn! Amike, *Trevor* kaj *Kajta Steele*




Je la 20a de septembro kelkaj Esperantistoj kunvenis en Tuvumba por jarkunveno post longa tempo. Paul Howlett estas prezidanto nun kaj Sandra Connors estas sekretario / kasisto.

# Radiotono

Post tri jaroj da interompo pro Covid nun okzas en 3ZZZ la tradicia radiotono. Ĝi komenciĝis la 1an de oktobro kaj por kompensi daŭros ĝis la fino de la monato. 3ZZZ ne povas funkcii sen la financa subteno de la membrokotizoj kaj la donacoj kadre de radiotono. Kvankam la elsendantoj estas volontuloj, la elspezoj multas: elektro, retejo, permesilo por elsendi muzikon, renovigo de la ekipaĵo de la studioj , trejnado de la elsendantoj. La malnova dissendilo de la montaro Dandenong estos anstataŭita de nova dissendilo en la centro de Melburno. La ŝanĝo kostos 135 000 dolarojn. Po ĉiu horo de programo necesas arigi 1000 dolarojn .

Por ebligi la daŭron de la disvastigo de nia ĉiusemajna programo en Esperanto, aŭskultita de multaj eksterlandaj esperantistoj , bonvolu sendi donacon. Kiel kutime Heather kolektos la monon. Eblas kontakti ŝin telefone je la numero 0419895934 aŭ per retmesaĝo je la adreso erikino.48@gmail.com

La teamo de 3ZZZ antaŭdankas vin *Franciska Toubale*



**3ZZZ** Kadre de la elsendo de la 3a de oktobro 2022, Ilona Koutny prezentas la novan kurson pri magistraj studoj proponitan de la universitato "Amu" en Poznan. Estas pli da informoj pri la Baltaj Esperanto Tagoj, pri la ĉiujara evento en Pollando dum kiu estas legataj publike famaj literaturaĵoj , eĉ tradukoj en Esperanto. Feliĉo kaj ploro estas aliaj temoj de tiu elsendo







*FranciskaToubale*

La retadreso de Esperanto-Ligo de WA presita sur la lasta linio de TRAVIDEBLA LINGVO INTERRETE (TRAVIDBLA LINGVO INTERRETE) Aŭstraliaj Esperantistoj #602 estis malĝusta. Ĝi devus esti esperantowa@hotmail.com *Trish o'connor*



# Oni ofte forgesas ke maljunuloj spertis junecon



**kaj junuloj spertos maljunecon.**

Mi bone memoras kiam mi estis la junulo inter la Esperantaj amikoj. *Roger Springer*



# Skribu pri via klubo